

Johann Wolfgang von Goethe,  
Martrankvilo

*tradukita de Richard Schulz*

Silentego en la akvo,  
Sen ondado nun la mar',  
Zorgoplenas la ŝipestro,  
Malstreĉitas la velar'.<sup>2</sup>  
Triste staras nun la masto.  
Semoveco kun terur'!  
En la giganteca vasto  
Morta ŝajnas la natur'.

*Traduko de la Germana poemo "Meeres Stille" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

*Arg-267-539 (2013-02-26 15:13:25)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Mindeno (Minden). La kvaran kaj kvinan liniojn de la poemo mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-08 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto "vidas" oni devus uzi la akuzativan formon "velaron". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

Johann Wolfgang von Goethe,  
Mara trankvilo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kalmo regas sur la maro  
Kaj senmove kuŝas ĝi.  
Zorge vidas la ŝipisto  
Glatan facon ĉirkaŭ si.  
De nenie blovas vento!  
Mort-trankvilo en la rond'!  
En enorma la silento  
Ne moviĝas iu ond'.

*Traduko de la Germana poemo "Meeres Stille" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-10-11.*

*MR-103-3 / Arg-267-538 (2004-09-08 15:26:09)*

---

<sup>2</sup>Rikardo Ŝulco skribis erare:  
Zorgoplene la ŝipestro  
Vidas pendu la velar'. (Mankas tie la akuzativo.)